Autunaj pensoj posttagmeze
(Őszi gondolatok délután)

Bukedo de brunighintaj floroj en la ghardena domo,
en la florbedoj velkitaj globoj de dalioj.
Perditaj vojoj en autuna nebulo,
mortintaj mesaghoj de forpasanta somero.

Kaj venas fornosidaj matenoj, longaj noktoj,
malghojaj ech malghojegaj brunaj tagoj.

Sed vi restos
por eterne.
Char vi estas la komenco,
kaj vi estas la fino,
la Alpha
kaj la Omega.
Vi estas la lumo,
kaj vi la mallumo.
Vi estas la ghojo,
kaj vi la malghojo.
Vi estas l' espero
kaj vi la dubo.
Vi estas la sinjoro
kaj vi la servanto.
Vi estas la vivo
kaj vi la morto.
Vi estas
promeso de facilaj songhoj.
Vi estas
kauzo de sendormaj noktoj.

Ami, al vi mi dungighis…
Sed….*Kiu transportas …?*

Sur la chielo palighas jam la steloj,
kaj eklumas sanktigitaj torchoj
de l' espero…

Tradukita de János Ruff